

INDE OMAGI LA PARTIAN KONGRESON!

Proksimiĝas gravega evento en la vivo de nia lando - la XXV-a Kongreso de KPSU. Al ĝi oni dediĉas novajn laboratingojn ĉe uzinaj stabloj kaj en sciencaj laboratorioj, sur kollezaj kampoj kaj en konstruejoj. La kongreso signas nun ĉiujn flankojn de la socia vivo, kaj kompreneble ankaŭ ni, esperantistoj, ne devas resti indifirentaj.

La Komitato de SEJM kaj, laŭ ĝia rekomendo, la novembraj regionaj renkontiĝoj pridiskutis la demandojn pri prepariĝo de SEJM al la Kongreso. Venis pluraj interesaj proponoj, kaj laŭ komisiono de la Komitato mi resumas ilin ĉi tie.

Antaŭ la Kongreso la kluboj, havantaj intensan internacian korespondadon, povas fari ekspoziciojn surbaze de leteroj de progresemaj E-istoj, ekzemple pri la temo "Progresemaj E-istoj pri la pacema ekstera politiko de KPSU kaj Soveta Stato". Ĉi-tamajn materialojn indas ankaŭ aktive uzi en loka gazetaro (radio, televideo), en prelegoj.

Ni rekomendas, ke la kluboj organizu kunvenojn, dediĉitajn al la Kongreso. Enhave tiaj kunvenoj povas esti diversaj depende de lokaj cirkonstancoj, ekzemple: renkontiĝoj kun delegitoj de la Kongreso, prelegoj pri la Kongreso kaj ĝia signifo, pridiskuto de partopreno de la klubanoj en eksterkluba socia vivo ktp. Gravas, ke la prikongresaj kunvenoj pasu altnivele, pri kio unuavice respondecu niaj esperantistoj-partianoj.

Oni ne forgesu nepre sendi salutleterojn kaj telegramojn al la Kongreso. En niaj mesaĝoj ni evitu ne modestajn postulojn, sed emfazu nian pretecon agi por bono de la socio, plialtigi la porpacan kaj internacian agadon. Al la kluboj ekster RSFSR ni rekomendas gratuli ankaŭ siajn respublikajn partiajn kongresojn.

Jam post la Kongreso ni povas fari novajn ekspoziciojn, ekzemple pri la temo "Monda gazetaro pri la XXV-a Kongreso de KPSU". Pri kolekto de materialoj necesas averti la eksterlandanojn jam nun. Se la ricevotaj materialoj ne sufiĉos por inda ekspozicio, oni povas kooperi kun samregionaj kluboj kaj aranĝi migran ekspozicion.

Gravas ankaŭ informadi pri la Kongreso kaj ties decidoj senpere al niaj korespondamiko, precipe el tiuj landoj, kie la infermoj pri Sovetio estas donataj misprezente.

Estas antaŭvidata eldono de kongresaj materialoj fare de la E-komisiono ĉe SSOD. Por tiu ampleksa laboro necesas tradukistoj. Volontuloj estas petataj anonci sin al la estro de la Traduka fako V. Samodaj - 113519 Moskva, ul. Krasnogo Majaka, 8-2-107. Gravan iniciaton ĉi-rilate proponis E-istoj de la Centro-Rusia regiono, kiuj preparas politikan terminaron por plifaciligi la redaktadon de tiu ĉi kaj estontaj tradukoj.

Kompreneble, mi ne elĉerpis ĉiujn eblajn formojn de perkongresaj aktivecoj, kaj ĉiu klubo agu laŭ siaj cirkonstancoj kaj ebloj. Gravas tamen, ke la farita laboro ne apartenu nur al la kluba kroniko, do ne forgesu aktivan informadon pri viaj aranĝoj: kaj sur la paĝoj de "Aktuale", kaj - en konvena formo - ankaŭ al eksterlanda E-gazetaro.

Ju pli aktive la SEJM-kluboj efektivigos la iniciatojn, ligitajn kun la Kongreso, des pli da aŭtoritato ni gajnos ekster la movado. Tial la proponataj laborodirektoj havas unuavican gravecon.

INVITAS S E F !

Oni ofte substrekas, ke Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ socia fenomeno. La lingvon esploras multaj, sed la socion? Vi rimarkis, ke jam ekzistas dekoj da "Historioj de Esperanto (movado)". La aŭtoroj skrupule dismetis la eventojn, sed kiuj el ili estis historiaj hazardaĵoj kaj kiuj aperas kiel neevitaj - tion ili ne montris (certaparte elstaras nur la verkoj de E. Drezen). Por trakompreni la movadon ni devas tion scii.

La movado disvastigas ne sur izolita planedo; kiaj estas ĝiaj rilatoj kun la ekstera mondo, politikaj, ekonomiaj faktoroj? Kiel ŝanĝiĝas la publika opinio pri Esperanto? Kiel evoluas la movadaj fertoj? La suprajn demandojn respondos SEF (Scienc-Esplora fako de SEJM).

Do, la movado estas esploroobjekte de SEJM; perkomenca ni limigu nin je SEJM mem (foj-foje, tamen, ni devas inkluzivi la movadon). Kiel al unu strukturo de la movado kaj certa labormetodo sukcesis en unu loko, sed en alia ne? Rolo de E-renkontigoj, tendaroj en la sovetia E-movado? Ĉu vastigo de interlandaj kontaktoj influas la movadon, kiomgrade? Ĉu indas atenton la psikologio de la esperantistaro, se jes, ĉu ĝi ŝanĝiĝas?

Nia tasko estas malkovri pli-malpli konstantajn strukturojn de la movado, ĝeneralajn tendencojn. La labore estas ne por unu, eĉ ne por du-tri jaroj. Tial perkomenca ni estu modestaj: ĝis la 1-a de marto ni konkretigos apartajn esplortemojn (ankaŭ vi proponu) kaj dividu ilin inter kunlaborantojn de SEF. Ion el la esploroj ni prezentos dum la E-Universitato en SEJT.

Ciuj, kiuj inklinas al sociologio, filozofio, psikologio trovas interesan okupon (kaj utilon!) en SEF. Ili kontaktu kun V. Silas: 232009 Vilnius-9, Daŭkanto, 8 - 9.

V. Silas, gvidante de SEF.

RADIOAMATORISMO? - TIO ESTAS SIMPLE!
(Fine. Komencen vd. en "A"-11)

Paciencon certe necesas havi ĝie, kaj vi, kiel E-isto, tion jam scias, nur al via pacienco necesas aldoni ion da deziro!

Do, via sekva paŝo (post kelkfoja aŭskultado de la etere) estas - kie kaj kiam trovi radioamatorojn, kiuj uzas E-on. Verŝajne multaj scias, ke ekzistas organizaĵo ILERA (Internacia Ligo de esperantistoj radioamatoroj), kiu havas kunsidojn dum Universalaj Kongresoj. Ekde 1970 UK enhavis kunvenojn de radioamatoroj, laŭeble kun radiostacio.

La 60-a UK ankaŭ havis samajn kunvenojn, kaj la radiostacion dum UK organizis Renata Chassard el Francio (voksigno F5RC). Laŭ ĝiaj informoj la kunvenojn partoprenis 3 gejapanoj, reprezentantoj de Kanado, Kolombio, Svedio, Aŭstrio, Danlando kaj Francio. Dum la kunvenoj estis proponitaj horaro por multigi kontaktojn kun esperantistoj aŭ simpatiantoj. Estis adaptitaj frekvencoj 21,066 kHz aŭ 14,044 kHz QRM por la telegrafio kaj 21,266 kHz aŭ 14,266 kHz ± QRM por la fonio. Oni interkonsentis uzi jenajn horojn en sekvaj tagoj - tagoj de semajno:

Frekvenco	21,066 kHz	14,044 kHz	Lundo	Merkredo	Sabato	Dimanĉo
	aŭ 21,266 kHz	aŭ 14,266 kHz				
Horaj	8.00	8.30				
	12.00	12.30				
	16.00	16.30				
	20.00	20.00				

La horoj estas laŭ la hor sistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Tiaj ĉi horoj, certe, bone taŭgas por la eŭropa parto de Sovetunio, tamen eĉ el Barnaul ĉe bonaj sterkondiĉoj mi povis sufiĉe bone kontakti kun radioamatoroj el Francio, Anglio, Svedio, FRG, Italio, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Finnlando, Danio.

La sudamerikaj E-radioamatoroj havas aliajn horojn por kontaktoj (QSO-j), sed ilin estas tre malfacile ekaŭdi. Tamen al la interesigantoj pri ilia horaro mi povas tiun informon doni laŭ aparta sinturno al mi.

Aldone al ĉi horaro mi uzas la samajn frekvencojn ĉiudimanche:
 la frekvencojn 21,266 kHz de 4 h. ĝis la 6 h. GMT (Greenwich);
 " " 14,266 " de la 12 ĝis la 15 h. GMT;
 " " 14,266 mi uzas ĉiun trian merkredon de ĉiu monato post la 14 h. GMT (speciale por kontakti kun sovetaj R-amatoroj kaj UK2BBB persone).

Do, sukcesojn al vi, dezirantoj laregi siajn kontaktojn kun esperantistoj! Ĉe radioamatoroj tiu ĉi eldiro estas tre mallonga - 73! Mi atendas ankaŭ viajn voĉojn en la etero!

Amike UW9YE (656099 Barnaul-99, abon.k. 60, Jaskov G. - estre de la Radioamatora fako).

POR AŬ PER?

Denove kaj denove surpaĝe de "Aktuale" kaj en aliaj lokoj aperas riproĉoj, ke E-istoj okupiĝas pri "Esperantujo", "amika rondo", "samideanoj" ktp. anstataŭ okupiĝi pri veraj aferoj: peresperanta agado.

Apenaŭ iu dubas pri neceso de praktika utiligo de la lingvo. Sed mi ne opinias, ke ĝi devas subpremi la peresperantan agadon. Dum E-e estas malmulte utiligata, apenaŭ ni allogos al ĝi homojn pro la nura praktika apliko de la lingvo. Male, en la nuna situacio la homoj estas plejparte altireblaj per idealismaj motivej.

Certe, neniu kontraŭus disvastigadon E-on per jenaj alvokoj: "Legu milejn da scienc-teknikaj libroj en E-e! Kiam ajn vi povas veturi al eksterlandaj E-arangoj! Abonu scienc-fikciajn revuojn en E-e!" ktp., ktp. Neniu kontraŭus, se tio estus vero.

Sed kion ni povas proponi al niaj alparolantoj? Fakte nenion - eĉ ne lernolibron, nek vertaron, nek landan aŭ internacian revuon, ofte nek kurson aŭ rondeton!

Dum la lasta kunsido de la Hungara E-Asocio (oktobro 1975) la ĉeestanta reprezentanto de la Landa konsilantaro de Sindikatoj en sia parolado diris: "La instruado de la Internacia Lingvo estas nun la ĉefa problemoj kaj tasko de la Asocio."

De la unusvican taskon propagandi kaj disvastigi la lingvon komprenas eĉ eksteruloj: sen homoj eblas neniu agado... Tial ni ne dehaku la branĉon, sur kiu ni sidas!

B. Kolker (Ufa).

AL PLI VASTA KULTURA INTERŜANĜO

La Internacia Lingvo estas rimedo por interŝanĝo de la kulturaj valoroj. Per ke ĝi povu bone plenumi tiun rolon, certe, estas necese organizita Esperanto-movado, ties konscia direktado al plenumado de tiu ĉi funkcio. Nia soveta E-movado nuntempe staras sursojle de sia organizo. Tio signifas: ekzistas jam elementaj organizoj: rondoj, kluboj, sekcioj, grupoj; ekzistas jam "formo de kunagado" - SEJM; Ni faru paŝeton antaŭen: ni komencu ioman organizitan kunlaboron ankaŭ per la Internacia Lingvo.

Mi proponas jenon. Nia lando Sovetio estas multnacia. Ĉiu el la nacioj havas historion de sia progresema kulturo, kiu nun, en fave-

raj kondiĉoj, fluis kvazaŭ en unu grandan fluejon - la multnacion soveta kulturo. Tiu lasta estas al ni en detaloj pli-malpli konata, sed ĝiaj fontoj, de kie elfluis la unuaj "areroj", kaŝiĝas malantaŭ jardekoj, kelkfoje eĉ malantaŭ jarcentoj. Ilin konas ofte nur la konkretaj nacioj, ilin naskintaj.

Ni, esperantistoj, apartenas al tiu ĉi "elito", kiu plej bone scipevas aprezi kulturajn valorojajn de aliaj popoloj kaj nacioj, kiu pleje perceptas esencan de la internacia amikeco, de la proleta internaciismo. Sed la lastaj ja ne povas ekzistadi kaj evolui sen konado kaj aprezado de la kulturaj atingoj de aliaj nacioj.

En niaj sovetaj respublikoj oni inde celebras gravajn datrevenojn de la lokaj (naciaj) progresemaj kulturagantoj, elstaraj filoj kaj filinoj de la nacio. Ni, esperantistoj, povas tion fari ankaŭ pli vaste, eĉ tutsovete. Materialojn, kiujn ni preparas tiukaze per niaj kluboj - ni konsideras preleg(et)ojn 10-15-minutajn - ni povas tajpi en kelkaj ekzempleroj, eble eĉ multoblige per pli modernaj iloj, kaj sendi al tiuj kluboj kaj rondoj, kiuj tion deziras, kun kiuj ni interkonsentis pri interŝanĝo de kopieritaj materialoj. "Amikeco" kaj "Aktuale" povas ilin aperigi, se ili ne estas tro multaj. Se temas pri pentristoj, la prelegetojn povas akompani ankaŭ bildomaterialoj, pri komponistoj - sonbendoj, resendendaĵoj aŭ ne. La materialoj povas esti ankaŭ "migrantaj".

Per tia agado ni ne nur konatigos reciproke niajn naciajn kulturojn - la fontojn de la ĝenerala soveta kulturo, ne nur pliriĉigos niajn konojn kaj plifortikigos nian internacian amikecon, sed ankaŭ pliriĉigos la programojn de niaj klubvesperoj, variigos ilian enhavon.

Tallinna Esperanto-klubo proponas tion kunlaboron al aliaj kluboj, rondoj ktp. El nia flanko ni proponas per 1976 jenajn materialojn el Estonio: J.Köler - pentristo, pioniro de la estona pentroarto - okaze de la 150-a naskiĝtago la 8-an de marto; G.Lurich - luktisto, mondĉampiono 1901 - okaze de la 100-a naskiĝtago la 26-an de aprilo; Hilda Dresen - Esperanto-poetino - okaze de la 80-a naskiĝtago la 11-an de majo.

Interesiĝantoj pri la proponita kultura interŝanĝo bonvolu skribi (kun konkretaj proponoj) al:

200001 Tallinn-1, Raekeja pl.14, Ŭpetajate Maja, Tallinna E-kl.
J.Ojalo (Tallinn).

MATERIALOJN DE LA 17-a KONGRESO DE VLKSM - POR EKSTERLANDO!

En julio la Komitato de junularaj Organizaĵoj (KMO) eldonis en Esperanto materialojn de la 17-a Kongreso de VLKSM. Zonda ekspedo de la broŝuro eksterlanden (Svedio) montris, ke tie estas konsiderinda kvanto da E-istoj politike favoraj al ni. Ili devus utiligi la broŝuron laŭ ĝia destino, manifestante poste sian interesiĝon pri tiaj E-dokumentoj ĉe la Komitato (KMO) kaj la komsomola CK.

Karaj gesamideanoj! Eltrovu ni inter niaj korespondantoj (burga kaj tria mondo precipe) niajn politikajn simpatulojn, kiuj dezirus ricevi la broŝuron kaj apliki ĝin en sia socia aktivado.

El la sukceso de la kampanjo sekvos:

- 1) Praktika uzo de Esperanto en la batalo por la socia progreso (la ĉefa ideo de la esperantismo);
- 2) La plej efika distribuo de la broŝuro ankaŭ en landoj, kie apenaŭ ekzistas nacilingvaj sciigoj pri la dokumento;
- 3) La proponata vojo estas efika por pruvi al la superaj instancoj realan valoron de Esperanto, kaj el la precedenco (la unua postmilita preso de komsomelaj dokumentoj en E-to) kreskigi fruktedonan arbon de pluraj eldonoj!

Ĉiujn adresojn de la eksterlandanoj, ideojn por la kampanjo direktu al Lev Vladimiroviĉ Medvedev:

143013 st. NEMČINOVKA Moskovskoj obl., Borodinskaja, 7; H. tel.: 44-89-25-7.

Por imagi la nunan distribuon de la broŝuro en Sovetio, mi petas ĉiujn posedantojn komuniki al mi pri tio.

Esperante amasan kunlaboradon vin salutas sekretario pri organizaj kaj sciencaj aferoj de la SSOD-a E-Komisiono

L. Medvedev.

PRI "INFORMA KOLEKTO"

La novefondita Informa fako sin bazas sur la ĝis nun eldonita "Akerdo" (ĝis la somero 1974), ~~ĉi~~ somere 1975 ~~ĝi~~ transformiĝis je "Informa kolekto". Tri jarojn laŭvice ĉion prizorgis: kompilis kaj dissendis - la junulara klubo de Riga. La "Informa kolekto" estas duonmonata kolekto de:

- ĵurnaloj kaj gazetoj kun priesperantaj artikoloj;
- leginda priesperanta materialo, ekz.: presitaj laborplanoj de kluboj, invitiloj al vesperoj, kunflugo k.s.;
- alia materialo, interesa por ĉiuj SEJM-klubo.

La sola kondiĉo - la senditaj kontribuajtoj devas konsisti el minimume 50 ekzempleroj (por ĉiuj aliĝintaj kluboj kaj kandidatoj), ĉar dume ni ne havas eblecon de multobligado.

La klubo sendinte pro la kontribuo al "IK" laŭ la Taksa demando ricevas koncernan kvanton da poentoj. Aparte klubo kontribuante devas ricevi poentojn pro aldonita al la kontribuaĵo traduko de artikolo aŭ anonco. La detalan pritakson de poentoj vidu en la Sekretaria libro por la agadjaro 1975/76.

Por plifaciligi la laboron pri "IK":

1. Ĉiu klubo elektu respondeculon, kiu persone havas kontaktojn kun "IK". Lia tasko estas ĝustatempe akiri kaj sendi al "IK" la bezonatan kvanton da gazetoj, ĵurnaloj k.s.

2. La kontribuajtojn adresu NUR laŭ la adreso de "IK", kiu ĉiam estas indikita sur la koverto (sed ne laŭ la adreso de la Korespondaserve aŭ aliaj hejmaj adresoj).

Rimarkoj:

Estas peto ne sendi vian kontribuajton en du, tri paketoj dum kelkaj semajnoj, ĉar:

- a) tio aldonas pli multe da laboro - oni devas registri, al kiuj kluboj estas jam ĉi materialo forsendita, kaj al kiu ne;
- b) en okazo, se "IK" ricevas nesufiĉan kvanton de la kontribuajtoj, ĝi estos distribuita laŭ la listo de la rezultoj en la Socialisma konkurado (malgraŭ, ke tio donas aldonan laboron por "IK"), kaj la klubo sendinte en sia paketo ne ricevos la koncernan materialon.

T. Bercis, estro de la Informa fako (Latvio, Riga 226050, p.k. 52, Riga junulara E-kl.).

NOVA LIBRO

Fr. R. Kreutzwald. KALEVIPOEG. Estona popola eposo. /Fragmentoj/. Trad. Hilda Dresen. Eldonejo "Eesti Raamat", 1975. 7000 ekz., 92 p., 60 kop.

Ankoraŭ ne estas ĉiutagaĵo, ke aperas libroj en la Internacia Lango, pro tio - mi opinias - ne estas superflue diri kelkajn konatigajn vortojn pri la ĵusaperinto. Des pli, ke ĝi estas verke tiom elstaranta el la vidpunkto de ĝia kreintonacio.

En la unua duono de la 19-a jarcento la nome "estono" ankoraŭ ne estis konata. La estona popolo estis en servuta sklaveco, subpremita fizike kaj spirite. Oni konsideris estonojn kiel estaĵojn senrajtajn, preskaŭ egalajn al laborbestoj, parolantaj "negermanan lingvon". En tiu cirkonstancoj por pruvi al la klera mondo hemvaloron de la subpremitoj, por vekii ilian konscion pri sia homa valoro, estis necesmentri, ke tiuj "kvazaŭhomoj" tamen havas sian edifan folkloron kaj kapablon al kultura kreado, ke ilia malŝatata lingvo estas taŭga por esprimi sentojn kaj pensojn, krei artverkojn. Por vekii en la sklavigitoj senton pri ilia nacieco, krei en ili la nacian konscion, estis plej unue necese rememorigi al ili, revivigi antaŭ iliaj okuloj la heroon pasintecan kaj iaman liberecon. Tiun taskon plenumis Fr. R. Faehlmann (1798 - 1850) kaj Fr. R. Kreutzwald (1803 - 1882).

Kalevipoeg (Tilá de Kalev) estas kamparanea laborfortegulo, konstruisto, marveturisto, en kiu trovis sian poezian ĝeneraligon la popolo kun sia karaktero kaj vivokonceptoj. Aspiroj de la heroo estas paca kaj krea laboro, batalo kontraŭ tion minacantaj malamiko. Rilate al subpremitoj li estas liberiganto kaj defendanto, kies agado direktiĝas al ĝenerala bonstato. En furioza batalo kontraŭ fremdaj konkerantoj ("feruloj") el la buŝo de Kalevipoeg kelkfoje adigiĝas alvekoj por virece defendi la liberon, batali por ĝi kun plena decidemo, resti fidela al sia patrolando kaj popolo.

Per "Kalevipoeg" efektive komenciĝis la estona nacia literaturo. Ĝi fariĝis unu el la plej potencaj angulŝtonoj de la estona literaturo, la verko, havanta eksterordinaran influon al la evoluo de progresemaj sociaj ideoj kaj batalaktiveco de la vastaj popolamasoj, tiutempe kontraŭ la feŭda sklavigo, sed poste ankaŭ kontraŭ kia ajn subpremo, inkluzive la faŝisman okupadon dum la jaroj 1941-1945. Ĝi estas unu el la plej disvastiĝintaj verkoj de la estona literaturo. Oni povas konsideri ĝin kiel verkon, apartenantan al mond-literaturo, oni konas ĝin internacie pli ol iun alian verkon de la estona literaturo. En la rusa (proza) traduko la eposo aperis jam 1886-1889. En bona rusa versa traduko ĝi aperis en 1949 (V. Derjavin kaj A. Kotŝetkov). Per ĝi tiu traduko "Kalevipoeg" plej multe disvastiĝis en Sovetio, sed ankaŭ en aliaj landoj. Sub la influo de "Kalevipoeg" A. Pūmpur verkis la latvan eposon "Latŝpesis".

En la altkvalita traduko (kun aliteracioj kaj asonancoj) de H. Dresen aperintaj fragmentoj konsistigas unu dekonon de la tuta eposo. La eldonaĵo estas ilustrita.

Sovetaj esperantistoj povas mendi la libron pere de lokaj librovendejoj (okaze de ilia konsento), kiuj direktu siajn mendojn al "Estknigotorg", Tallinn-90, Pärnu mt. 10; pere de "Libro per poŝto", Tallinn-90, p.k. 199; pere de Tallinna Esperanto-klubo laŭ la adreso: 200001 Tallinn-1, Nervskoe Ŝosse, 23-5, J. Ojalo.

El la pli fruaj eldonaĵoj estas ankoraŭ riceveblaj: J. Ojalo "Esperanto keele Ēpik" (31 kop.) kaj E. Krusten "Okupacio" (38 kop.).

J. Ojalo (Tallinn).

"AMIKA RONDO" VIN INVITAS

Se vi ion kolektas (ekzemple, poŝtmarkojn, bildkartojn, insignojn, librejn ktp.), tre utila por vi estos helpo de viaj amikoj, loĝantaj diversloke. Ĉu ne estus por vi tre oportuna de tempo al tempo havi ankaŭ freŝan infermon pri intersanĝeblecoj?

Al ĉiuj kolektantoj mi tre rekomendas iĝi ano de la internacia klubo de esperantistoj kolektantoj "Amika Rondo". La membreco kaj aperigado de anoncoj estas tute senpagaj. La klubo eldonas kvaronjargan bultenon "Kolektanto". Per ricevadi ĝin oni devas pagi 2 rb. jare. Ĉiu abonante rajtas sendi anstataŭ mone kompletajn neuzitajn seriojn de poŝtmarkoj, E-librejn, insignojn kaj E-aĵojn laŭ interkonsento.

Aligilon kaj pli detalan klarigon sendos al vi la sekretario de la klubo L.Leviĉarev: 1113 Sofia, p.ĉesto 5, Bulgario.

V.Gakalenko (Tiflvin).

FAKAJ LABORGRUPOJ

En la oktobra numero de "A" aperis artikoleto pri fakaj laborgrupoj de SEJM ("A"-10, p. 130-131), kiu enhavas liston de dezirantoj kunlabori kun 5 SEJM-fakoj.

Fakte tiu listo estas nur malgranda parto de la adresaro, kompilita dum SEJT-17. La kaŭzo de miskompreno estas jena. Kolektinte dum SEJT ĉiujn sciigojn pri fakaj komisionoj, mi jam en la tendaro disdonis ilin al la ĉeestantaj fakestroj, kaj la vicprezidentino pri la faka agado ricevis nur tiujn donitaĵojn, kiuj estis destinitaj por la forestantaj fakestroj. Tiu sama listo estis publikita en "A"-29. Jen estas aldono al ĝi.

Scienco-Teknika fako: T.Bercis (Riga); V.Zibenkes (Salavat); V.Sokolov (Kolonna) - okupiĝos pri terminaroj.

Bibliografia fako: O.Graĉova (Ivanovo); Z.Lapienyte (Klaipeda);

Metodika fako: V.Bingelis (Vilnius); V.Kulikov (Omsk); G.Gercikov (Talgar); N.Sibircev (Novosibirsk); V.Nočovkin (Poltava); V.Golencova (Ufa);

Kolektanta fako: S.Gaidamavičius (Vilnius); T.Bercis (Riga); V. Butorin (Talgar) - poŝtmarkoj; G.Gercikov (Talgar) - E-insignoj; A.Kolesnik (Poltava); T.Kravĉinskaja (Dimitrovgrad).

Lerneja fako: V.Golencova (Ufa); S.Smetanina (U-Kamenogorsk); D.II. Jušina (Ivanovo).

Kanta fako: G.Gercikov (Talgar); L.Borisev (Kolonna); N.Medvedeva (Tula); G.Cejtin (Leningrad); T.Bercis (Riga); V.Silas (Vilnius); F.Juĥvidin (Ufa) - nur klasika muziko; N.Dolganova (Sizranj) - nur klasika muziko; D.Mametova (Tjumenj); L.Novikova (Miass); M.Gilinskij (Leningrad).

Magnetofona fako: G.Graĉjite (Vilnius); V.Kulikov (Omsk); E.Perevertajlo (Taškent) - nur kontribuante;

Radioamatora fako: V.Silas (Vilnius); N.Ipatova (Ufa).

Traduka fako: V.Sporifin (apudmoskvo); N.Cvileneva (Ufa); M.Gilinskij (Leningrad); G.Fomenko (Ufa).

Informa servo: V.Golencova (Ufa); V.Zibenkes (Salavat); T.Koptjagina (Miass); T.Kravĉinskaja (Dimitrovgrad).

Historia fako: (krom la personoj, indikitaj en "A"-10, p. 130) N. Butau (Novosibirsk).

Malgraŭ la aserto de N.Cvileneva, dezirantoj labori ĉe SEJM-fakoj ekzistas. Bedaŭrinde troviĝis eĉ ne unu deziranto por la Poezia fako. Kiel mi jam skribis supre, ĉiuj fakestroj, ĉeestintaj la tendaron, jam havas plenan liston de siaj kunlaborantoj kune kun la hejmaj adresoj. Ĉe mi tiuj adresoj ne restis, pro tio mi indikis nur la urbojn, en kiuj loĝas la fakunlaborantoj.

M.Belogolevskij (Doneck).

E-RADIOJ BEZONAS VIAJN LETEROJN!

Aŭskultado de E-disaŭdiĝoj de diversaj stacioj estas ege grava ne nur por plibonigo de nia lingvoposedo, ĝi prezentas al ni ĉiam plej fresajn informojn el la tuta Esperantujo (kion ni ne povas

diri pri la E-gazetaro). Partopreno en diversaj konkursoj, organizataj de la E-Redakcioj povas ofte ankaŭ esti tre bonŝancaj. Sed eĉ simpla peto de informo pri diversaj aranĝoj ankaŭ utilas ne nur por laboro de E-stacioj (ni memoru la malgajan historion de la Budapeŝta E-Radio: ĝi ĉesis siajn disaŭdigojn nur pro la nesufiĉa interesiĝo de aŭskultantoj, pro iliaj tro malmultaj reĉoj), sed ankaŭ por ĉiu E-isto. Ekzemple, la Viena Radio (P.O. BOX700, A-1041 VIENNA, Aŭstrio) premias ĉiun kvaran alskribon per E-sondisko. Sufiĉas eĉ mallonga poŝtkarto.

Petu detalajn informojn de la Viena E-Radio pri jenaj aferoj:

1. Antaŭkristnaska semajnfino en Londono.
2. Internacia vintra E-ferio en Aŭstrio de la 7-a ĝis la 13-a de januaro.
3. Internacia E-klubo de aŭtomobilistoj.
4. Porblindula sonbendrevuo, eldonata de Harold Tradas (Aŭstrio).
5. Internacia Rondo amika de E-literaturo kaj kulturo, fondita de Ludvig Pickel (Germanio), kiu ebligas favorajn prez reduktojn.
6. La dua eldono de la literaturkonkurso "Larius" (Romo, Italio) kun tri sekcioj pri esperantlingva literaturo.

La disaŭdigoj de la Viena Radio estas aŭdeblaj sur la ondoj 13,7; 16,8; 19,4; 41 kaj 49 metroj sabate je la 19²² -19²² kaj dimanĉe je la 8⁴⁵ - 9²² (Moskva tempo). La vienaj E-programoj marde je la 19²² sur meza ondolongo, nome 203 m. estas bone aŭdeblaj ankaŭ eksterlande.

Por tiuj, kiuj tamen ne havas eblecon aŭskulti la Vienan E-Radion, sed dezirus havi ties disaŭdigojn, mi pretas sendi surbendigitajn kopiojn de la disaŭdigoj ĝis 2 horoj kun 3 rapidecoj: 9,5; 4,7; 2,4 laŭ dezire. Sufiĉas nur sendi al mi la deziratan kvanton de sonbendo, indikinte la rapidecon de via magnetofono. La surbendigoj estas sufiĉe bonkvalitaj. Kaptu la okazon pliriĉigi viajn klubajn kunvenojn.

V. Bernalov (354000 Soĉi-centro, poŝtkesto 6).

NI MATURIGU IDEOLOGIE!

Laŭ mi E-isto en sia laborejo devas esti tre sociema homo. E-istoj nepre membrigu al diversaj societoj, ekz. societo "Scio". En multaj urboj estas organizita societo de libreamatoroj, en kiu oni ankaŭ povas fruktedone labori por E. Ekzemple, nun oni vaste celebras la 80-jariĝon de S. Esenin. Eble ie E-istoj provu fari prelegon "S. Esenin en Esperanto" al ien alian.

Ankaŭ estas tre grava, ke esperantistoj tre bone sciu la internacian staton en la mondo kaj serioze rilatu al la problemoj de ideologia batalado, ĉar ili pli ofte ol aliaj povas renkontiĝi kun alilandanoj, kiuj havas malsamajn al ni ideologiajn vidpunktojn.

Al mi ŝajnas, ke niaj someraj universitatoj kaj renkontiĝoj ĝenerale havas mankojn de tiu vidpunkto. Oni devas pensi pri novaj formoj de politika kaj ideologia edukado de nia esperantistaro, sin bazante sur la fundamento de komunismaj ideoj. Certe, tio estu farate tute ne trude. Modele de tio laŭ mi estas la mitingo en SEJT-17, dediĉita al la 30-a datreveno de la Venko. Por sekvontaj tendencoj similaj ~~stoj~~ eroj politikaj kaj ideologiaj estas nepre bezonataj. Niaj verkistoj de kantoj klopodu pri politikaj kantoj. Iu povas diri, ke tiaj politikaj elpaŝoj jam tedis. Sed mi ankoraŭ substrekas, ke, se la elpaŝoj havas interesajn formojn, ili al neniu tedos. Sed en nia tempo - tempo de la akriĝo de la ideologiaj bataloj - tio estas por ni vivebezonata, ĉar ni estas en la unuaj vicoj en la batalo por paco kaj triumfo de komunismaj ideoj.

I. Korolev (Bijsk).

"ORA FOLIO-75"
aŭ pro kio niaj Renkontigoj suferas

Tiu ĉi artikolo kronas la serion de informaj artikoloj pri diversregionaj renkontigoj. En ĝi estas kritike analizataj ne nur la kialoj de fiasko de la tradicia renkontigo "Ora Folio", sed estas levata grava problemo, kiel la ĝenerala nivelo de preskaŭ ĉiuj Renkontigoj falis, kaj multiĝas okazoj, kiam antaŭplanitaj entreprenoj entute ne okazas. La Redakcio aliĝas al la deziro de la aŭtoro ricevi ne nur konsentajn aŭ oponajn reŝojn, sed ankaŭ konkretajn sobrajn proponojn kaj konsilojn.

En fino de septembro 1975 okazis plena kunveno de Riga junulara E-klubo, kie ĉefe oni diskutis pri la demando, ĉu aranĝi ĝis tiam tradician aŭtunan regionan renkontigon "Ora Folio-75". Post longaj tre seriozaj paroloj oni decidis: NE ARANĜI. Kial? Tre klaran kaj akran respondon donis unu radietanino: por esperantistoj (oni substrekas: esperantistoj) la Renkontigo fariĝis neinteresa. Similajn distrafojn: ekskursojn, kantadon, amuzadon oni povas ĝui en turismaj bazoj, turistaj kunflugo. Elstaraj niaj E-aktivuloj dum lastaj jaroj jam ne partoprenadis la aranĝojn. Sube ni analizu kelkajn bonojn kaj kelkajn mankojn, kiuj estis rimarkitaj dum la lastaj "Oraj Folioj". Fakte ĉi artikolo celas nur koncizan analizon pri la "Oraj Folioj". Ĝi ne povas, nek celas liveri detalan raporton pri la okazaĵoj.

1. Komprenoble evento, kiel "Ora Folio", postulas multmonatan zorgan preparadon. Ĝenerale tiel ne okazadis. Efektiva preparado komenciĝadis nur pli-malpli 2-3 semajnojn antaŭ la kunvenoj. Multaj detaloj, kiel gastigado, horaro, koncertoj, iam kaŭzis konfuzon, ĉar oni funde ne zorgis anticipan planadon.

2. Ĝenerale la aliĝoj al "Oraj Folioj" ne estis tiel multnombraj kiel oni esperis. Tion kaŭzis tro malfrua sendo de 1^a invitiloj. Multaj personoj, kiuj povus esti venintaj, se ili estus frue avizitaj, ne partoprenis pro la lastmomenteco de informiloj.

3. Kial okazis tiu nepreparo? Unue, tute mankis kontaktado kun la organiza komitato. Due, ĉiuj partoprenintoj (escepte kelkiujn) sendis aliĝkotizen post la limdato. Ekzemple, por ke okazu OF-71, la organizantoj devis prunti propran monon per lokomendo. Tria, la loka komitato konsistis preskaŭ ĉiam el freŝaj, respertaj esperantistoj, kvankam bonvolemaj. Kvare, ankoraŭ mankas en nia movado sufiĉe serioza sinteno rilate Tendarojn kaj Renkontigojn, kaj tial alirespublikaj samideanoj preskaŭ senescepte lasis la tutan laboron kuŝi sur la ŝultroj de kelkiuj.

4. La ĵus cititaj faktoj lecionas al ni tre klare: por "Neĝfloketo-76" ni devas de nun eklabori, ne nur en Riga, sed ankaŭ en ĉiuj lokaj kluboj, eĉ se nur sendante proponojn kaj ideojn.

5. Dum lastaj OF-oj tre pozitivan aspekton montris la inaŭguraj kaj fermaj kunvenoj, ĉar ilia daŭro senteble malgrandiĝis - malpli da diskutoj, pli koncizaj paroloj. Tamen estas tre dezirinde, ke la enhavo de tiuj paroloj fariĝu pli konkreta. Oni ankoraŭ tro multe retorikas kaj bombastas, anstataŭ liveri al la publiko informojn pri la celoj de 1^a renkontigo, konsisto de la kunvenoj, maniero de agado, rezultoj de tiu agado ktp.

6. Se okazadas dum niaj Renkontigoj, ke laborkunsidoj bremsas longaj kaj senenhavaj tezoj, ekzemple dum OF-71, - ili ne estis. Malhelpis nur neakurateco de la partoprenantoj. Dum OF-72, -74, tute mankis iaj tezoj: inter distraĵoj aranĝoj nur kelkaj partoprenantoj pripensis Movadaĵajn demandojn.

7. Jam delonge venis tempo, por ke niaj samideanoj konsciigu pri la graveco de esperantistaj renkontigoj. Ĉiu minuto de la kunsidoj estas altvalora. Sekve la tezoj prezentotaj devas plenumi du bazajn kondiĉojn:

- a) esti koncizaj kaj absolute klaraj;
- b) proponi ion vere realigeblan, konkretan, profitan por la Movado.

Kaj, se ĉiu minuto estas altvalora, oni ne rajtas perdi tempon per malakurataĵoj, ordinare kaŭzataj de koridoroj babiloj. Por "Negfloketo-76" do ni devas insisti pri maksimuma tempoprofito. Se tezoj plenumas la suprecititajn kondiĉojn, estas klaraj kaj konkretaj, kial ofte ili ne efektiviĝas?? Bedaŭrinde, ofte okazas, ke laborkunside la tezojn prezentitajn oni forte aplaudas, sed post la Renkontiĝo, Konferenco aŭ tendaro oni nenion plu faras. Tia manko ĝenerale makulis la antaŭajn: por ke la samo ne okazu nun, estas necese definitive konscii, ke la plej peniga kaj plej grava parto estas plenumata post la laborkunsideoj dum la tuta jaro. Ne nur la aŭtoro de tezo estas respondeca pri ties plenumo, sed, ĝis ioma grado, ankaŭ niaj aktivuloj kaj la ĝenerala publiko, kiuj ĝin aprobis.

8. Evidente ĉio ĉi devas premi aktivan partoprenon de 1^a publiko en diskutoj. Tiurilate "Oraj Folioj" ne povis superi aliajn aranĝojn - la partopreno de 1^a publiko ne estis tre vigla: ĝenerale parolis la samaj aktivuloj, ne multaj demandadis, ne interrompadis, ne aldonadis, - resume: ne estis pliriĉigita la enhavo de la laborkunsideoj. Devas rimarkigi, ke la plimulto de la partoprenantoj apatias. Ni energie pledu en la "Negfloketo-76" por absolute universala partoprenado.

9. Lingva nivelo: ĝi povus esti pli bona. Sed oni notu interesan fakton: la publiko ĉiam pli kaj pli tendencas rifuzi nacilingvadon. Eĉ en koridoroj babiladoj oni tre ofte uzis Esperanton. Tiu tendenco estas tre pozitiva akiro de niaj Renkontiĝoj, kaj ni nepre devas instigi en la "Negfloketo-76" pri maksimuma uzado de Esperanto. La gvidantoj de la grupoj devas zorgi pri evito de krokodilado ankaŭ en siaj ĉambroj.

10. Antaŭ ol pritrakti niajn koncertojn kaj belartan konkurson dum "Oraj Folioj", ni devas iomete analizi, kien devas celi arta spektaklo en esperantista renkontiĝo, ĉar pluraj misopinioj pri tiu ordinare neglektata sektoro libere vagadas. Por multaj ĝi celas provizi nur leĝeran amuzon post lacigaj kunvenoj, por aliaj ĝi celas doni ŝancon al samideanoj, por ke ili elmontru siajn talentojn. Eraraj opinioj! Meniu venas al Konferencoj, seminarioj kaj simplaj renkontiĝoj por amuziĝi; se oni tion dezirus, oni pli volonte frekventus teatrojn aŭ kinejojn.

Esperantistaj renkontiĝoj celas, antaŭ ĉio, konstante esplori novajn vojojn por la progresado de Esperanto pere de persona interŝanĝado de ideoj. Ankaŭ la arta spektaklo malfermas novajn vojojn, ĉar montras Esperanton, uzatan en plej diversaj sektoroj, kiel deklamo, kanto, teatro ktp. Ĝi estas tre taŭga instrumento por veki la konscion de 1^a esperantista publiko, pruvante taŭgecon de la lingvo, kaj instigante al ĝia lernado. La koncertoj estas ne neglektebla ŝanco por atingi la ĝeneralan publikon. Krome la koncertoj devas havi evidentegan ARTAN nivelon. Se oni kantas, oni ĝustatone kaj senteme kantu, se oni teatras, oni klare kaj impresive parolu, konvene gestu. Jen la minimumo farenda. Fuŝa muzikludo, senzorga aŭ tro pafosa deklamo kaj aliaj fuŝaĵoj ridindigas ne nur spektaklon, sed ankaŭ la Renkontiĝon kaj la Movadon Ĝenerale.

Nun estas demando, ĉu koncertoj kaj belarta konkurso dum OE-71 plenumis la ĵus ekzamenitajn kondiĉojn? Bedaŭrinde ne. Escepte unu aŭ du numerojn, kiuj savigis en universala drono, la cetero estis absoluta fiasko. Sen traigo, kelkaj numeroj hontigas eĉ plej tolerantan ricenziston. Sed pli forte, ol la manko de arta nivelo, gravas por ni la terura efiko, kiun ĝi faris al la neesperantista publiko. Kelkaj prezentitaj eroj ĝismodele ridindigis la Movadon por multaj personoj. Daŭrigo de la Konkurso ĝis la 2-a nokte ne pravis seriozecon de 1^a entrepreno.

Anstataŭ pli kritiki, ni analizu la kaŭzojn de tia fiasko kaj strebu forigi ilin por la Negfloketo-76. Precipa kaŭzo estis sendube la tre malfrua organizo. Sed forte kontribuis ankaŭ de konscie eri

manko

pri la graveco de tiu sektoro. Ŝi preskaŭ neniam dediĉas apartan atenton pri artaj okazaĵoj, kaj ankaŭ dum "Oraĵ Folioj" ili estis neglektitaj. Ĉe la lasta momento improviziĝis kelke da numeroj.

Ĉiuj lecionas al ni, ke per NF-76 ni devas ekde nun zorge preparadi. Improvizumoj devas esti radikale eliminataj, kontraŭe ni neniam sukcesos atingi taŭgan nivelon. Ni devas ne cedi al individuaj ventoj de sinkontemo, ni devas firme rifuzi petojn pri partopreno e en spektaklo, se ni scias, ke la eventuale prezentotaj numeroj ne plenumos la kondiĉojn de taŭgeco. Kaj antaŭ ĉio ni devas ĉiam rezoni pri la koncertprogramoj cele konvinkon al la ĝenerala publiko.

Traleĝante la supre skribitan, ni povas konvinkiĝi, ke nia sekvonta renkontiĝo "Nefleketo-76" devas esti pli konkreta, pli aktiva, pli universala kaj realisma. Ĉiu partoprenante dum la periodo SEJT-77 ĝis NF-76 devas ripetadi al si: kien mi faras por la Movado? Ĉiu en la kunvenoj devas partopreni per demandoj, diskatoj kaj raporto. Sed la raporto estu realismaj, la kritikaj konstruivaj, la proponoj konkretaj kaj precizaj.

De, ĝis revido en la "Nefleketo-76"!

P.S. Por ĉi artikolo la materialo estas aroge prenita el: 1) "Akordo" de 1970j.; 2) "Impulso" de 1968j.; 3) Decidoj de la regionaj renkontiĝoj "Ora Folio" de la 1969-a, -71, -74 jaroj. Mi esperas, ke ĉi artikolo havos aktivan reeĉon. Riga klubo pretas defendi sian starpunkton.

A. Medins (Riga).

"MUZO-75"

Ĉi-jare la literatura aŭtuno "Muze-75" estis dediĉita al la 100-jara jubileo de la litova pentristo-kompenisto M.K. Ĉiurlionis. kaj okazis la 4-6-an de oktobro apud Vilnius. La renkontiĝon partoprenis ĉeeste 35 esperantistoj kaj foroste 8. Estis prezentitaj la urboj Vilnius, Kaunas, Molietse, Klaipeda, Siauliai, Kapsukas, Pjarnu, Riga, Leningrad, Tiflino - ĉeeste kaj Moskvo, Lvovo, Taŝkent kaj Tallinn - foroste. Entute estis planitaj 8 konkursoj, sed pro manko de partoprenantoj la konkurso pri originala prezento ne sukcesis.

Tuj post la malfermo okazis konkurso pri bela lego, vespere - konkursoj pri originalaj kantotekstoj kaj de kantistoj. Ĉe la fajro okazis disputo pri la rolo de Esperanto-literaturo en la vivo de esperantistoj. Estis rimarkita, ke, vere, ni legas malmulte. Eĉ ne ĉiu aktivulo povas diri, ke li traĉlegis 2-3 librojn dum jaro. Post la disputo okazis konkurso de rakontistoj.

Kun granda plezure mi volas rimarki, ke la lingva nivelo de la renkontiĝo estis tre alta, verŝajne, eĉ pli alta ol tiu de SEJT-oj. Certe, per "Muze" tio ĉi estas bona, sed ĉu bona estas per SEJT-oj?

Dum la dua tago okazis ankoraŭ tri konkursoj: konkurso de parkera lego, de originalaj versoj kaj la unua fojon estis organizita konkurso de interpretistoj. Mi kaptas la okazon ankoraŭ foje danki la organizintejn pro tio, ke ili trevis por ni kaj A. Kogan ruslingvan tekston, per ke ni ankaŭ povu partopreni la konkurson. Verŝajne, la organizantoj de tendaro devas pripensi ĉi aferon kaj dum la interpretista konkurso havi tekstojn de iu partia dokumento, elpaŝojn de la estraro ne nur en la rusa, sed ankaŭ en aliaj (precipe ĉebaltiaj) lingvoj.

Dum nelongaj senkonkursaj horoj litovaj kamaradoj rakontis pri M.K. Ĉiurlionis kaj montris liajn pentraĵojn.

Dum unu el disputoj oni solvis la demandon pri organizo de tutlitovia centro pri prezotradukaĵoj. Vere, ekzistas malmulte da tradukaĵoj prezaj. Bone rimarkis V. Silas, dirinte, ke la historio de ĉiu literaturo komenciĝas de versoj, de ĉi tiu E-literaturo estas, verŝajne, infanaĝa, ĉu?

Eble en ĉiuj regionoj aŭ eĉ respublikoj devas ekzisti samaj centroj.

Ankoraŭ mi volas aldoni, ke la literatura enhavo povis esti eĉ pli bona, se "Muza" partoprenus homoj el Siberio kaj Volgo-Uralo. Pro tio ne estas bezonata nepre veno al "Muza". Ekzemple, mi ĝuste scias, ke tra multe verkas N. Cvilenova. Si, certe, povis sendi siajn kantojn al "Juneco", kiel tion faris V. Samodaj kaj aliaj kamaradoj. La saman povus fari Dina Lukjanec, L. Novikova kaj aliaj.

Do, kamaradoj, ni havas solan literaturan renkontiĝon, kaj, certe, partoprenado en "Muza" eĉ foreste estas tre granda subteno al la renkontiĝo.

M. Gilinskij (Leningrad).

UFA, NOVEMBRO 1975...

Mi volas geamikojn ĉirkaŭpreni...

Mi flugas al REVU! Al Ufa!

La tero! Ĉe la elirejo, el sub felĉapo, min rigardas du konataj okuloj kaj renkontas amika rideto de Alla Silantjeva (certe, ankaŭ vi memaras tiun blondan sveltulinon el SEJT-17); Kiel bone!

En la atendejo de la hotelo "Turist" jam sonas E-parolo. Kun grupo de gastoj venas simpattia kaj silentema Tanja Kulpina. Alkuras kaj denove forkuras Boris Kolker. Ĉiujn fervore registras Aleksej Aleksandrov. Li riproĉete okulumas min kaj sekvanmomente portas al mi varman pelton kaj ... gitaron.

Post gazetara konferenco

Tendaroj, renkontiĝoj, vesperoj atestas kaj subtenas nian vivecon. Ĉu ili havas signifon nur por ni, tiuj, kiuj partoprenas konkretan aranĝon? Ĉio, unuavice, dependas de la enhavo - Ĉu ĝi enhavas postrestaĵojn, plupusaĵojn, trajtojn. En unu el salonoj de la aviada instituto okazas malfermo de REVU-12. Mi ekscias, ke la plej malproksima gasto estas ne mi, sed Viktor Zafvatkin el Krasnojarsk, ke la renkontiĝon partoprenas 50 gastoj el 27 urboj (entute ĉ. 80 partoprenantoj), ke nur antaŭ duonhora finigis improvizita gazetara konferenco (kelkaj redakcioj sendis korespondantojn per materiale).

La salutparoloj havas aferecan karakteron: Tjumenio informas, ke ilia 14-membra grupo laboras kontakte kun la gerkemo, en kvar kursoj lernas 70 personoj, kunlabore kun la societo "Scio" jam okazis 20 prelegoj al pli ol 1000 aŭskultantoj. Bravulej! En la Volgo-Urala regiono oni laboras!

Parolas Vera Dobridina - Mjass: funkcias 6 E-rondetoj, okazis 10 prelegoj. Ludmila Novikova - vilage Ilek: "En mia lernejo "naskiĝis" 18 esperantistidoj". Zoja Skvarcova - Kujbiŝev: E-rondeto ĉe scienc-esplora instituto kaj en hospitalo de militinvalidoj. Natali Dolganova - Sizranj: 2 rondetoj, leteroj al 22 eksterlandanoj. Kravĉinskaja Tatjana - Dimitrovgrad: gelaboristoj lernas E-on. Vladimir Zibenkes-Salevat: vespere de traeksterlandaj vojaĝantoj, funkcias rondetoj. Viktor Mekarin - Kusa: E-stando en biblioteko. Farida Faizova - Satka: du prelegoj. Galina Celiŝĉeva - Perm: jam aperis E-klubo; ni ĉiuj estas lernantoj de Ufa klubo.

Paroloj; ; ; paroloj. Ĉion kronas Galina Fomenko, la prezidantino de Ufa klubo (mi enkaŭ kalkulas - jam ek enŝajnajn klubojn prezidas esperantistinoj kaj ne malbone!). Galina modeste informas: artikoloj aperas, rondetoj funkcias (sep), okazis televida elsendo (30-minuta).

Post mallonga paŭzo sekvas same mallonga koncerteto.

Vespere ni iris al la Baŝkira drama teatro por spekti "Elpensulo" ("Zatejnik") de R. Safin.

En la sekva tago, post la dematena ekskurso tra la unika urbo, ni kunsidis. "Kion faru esperantistoj por la 25-a kongreso de KPSU?"-te-

mo inda je la festo. Prezidis SEJM-komitatanino Nina Cvilenëva. Ektemis pri kunlabore kun la packomitatoj, kun eksterlandaj pacfortoj. Mi jetis ideon, peti al eksterlandaj amikoj, ke ili sendu gazetojn pri nia 25-a kongreso. Ĉiuj tuj aprobis ĝin. Iu proponis anonci sin ĉe SSOD por eventuala tradukado de la kongresaj materialoj.

Parolis, tamen, ne multaj, kaj mi havis impreson, ke pri la ĉeftemo de la renkontiĝo pluraj eksciis nur antaŭnelonge. Estas temoj, pri kiuj oni povas orateri senprezare, sed ĉi tiu ne estas tia.

Kiam la mastroj iras dormi...

Estas vaste sciata, ke esperantistoj ne drinkas, sed kison aŭ glaseton da bona vino ili ne rifuzas... Tio havas bonajn kaj malbonajn flankojn. Ekzemple esperantistojn ne tre ŝatas restoracioj... Ho, kiom penis B. Kolker por trarabati bankedan salonegon en la restoracio "Ora spiko"! La amikoj helpis; ni trinkas sekan vinon kaj ĉampanon...

Mi sidas inter du famaj Ninoj: Cvilenëva (kiu, verŝajne, sukcesos pri tio, kion ne faris viroj - laborigi ĉiujn SEJM-fakojn) kaj Korjenskaja. La penoj de la dua Nina jam delonge enkorpiĝis - la unuaj jarkolektoj de "Akordo". Sin mi konas jam de SEJT-10 en Altajo kaj asertas, ke ŝiaj kapabloj ankoraŭ ne elĉerpigis.

En apuda salono preskaŭ senĉeseseonigas la murojn instrumentuloj; por nia programo arta kaj alia apenaŭ regas "truojn". Ni do manĝas kaj dancas. Malgraŭ foj-foja toŝtado restas ankoraŭ N-kvanto da boteloj, kiujn ni antaŭvide subbaskigas kaj portas al la hotelo. Kiam la mastroj disiras hejmen, la iniciaton energie prenas Tatjana Kravĉinskaja el Dmitrovgrad. Ĉiunokte ŝia ĉambro estis plena de esperantistoj. Precipe dense ni sidas nun. Bonutilis la "ŝtelitaj" boteloj. Rakontoj gajaj kaj ne tre, kantoj sonis ĝis la 4-a matene. La mastroj jam delonge dolĉe vivis en sonĝoj, kaj ĉe ni ankoraŭ ŝmacas tiu kiskanto "kiu en januaro;..".

Kiam je la 10-a komenciĝis renkontiĝo kun "interesaj homoj - amikoj de Ufa klubo", la noktuloj estis ankoraŭ survoje al la kunveno. La unua antaŭparolis Utjatev M.M., estro de la organiza fako de partia rajkomo. Li ĵus revenis el la vojaĝo tra beniluksaj landoj kaj regalis nin per fresaj personaj impresoj. La dua sekvis Nekelbaum J.I., iam lerninta E-on ĉe Lidia Zamenhof, la filino de Ludoviko. La lasta - Vitalij Davidov, ĉampiono de USSR pri la radioamatora sporto. Tiu atentigis, ke inter esperantistoj kaj radioamatoroj estas komunaĵo - strebo kontakti alilandanojn, kaj invitis ufajn E-istojn eklabori en la etero (certe, kun lia helpo). Mia rakonto pri la verkado de la litova pentristo-komponisto Ĉiurlionis estis la lasta programero. Fermante la renkontiĝon, B. Kolker ĉien resumis kaj atentigis: al REVU-13 invitas Tjumenon.

REVU-12 finiĝis. Ni ĝisrevidis kun Ufa, kun urbo, kie laŭ aserto de B. Kolker ĉiu urbano al la demando "vi, kompreneble, scias, kio estas Esperanto" respondas jese.

V.Ŝilas (Vilnius).

OSER-25 EN BARNAUL

Okazis la 7-9-an de novembro.

Partoprenis: Krasnojarsk - 9 h.; Omsk - 1 h.; Ustj-Kamenogorsk - 6 h.; Meĵdureĉensk - 2 h.; Kemerova reg. - 1h.; Barnaul - ĉ. 20 h..

"Plaĉas - ne plaĉas" - tiel, verŝajne, ni ne povas diri. Ĉu estis ĝi utila, fruktodona por la movado - tio estas la plej grava demando kaj la plej bona kriterio por juĝi.

OSER estis planita kiel poraktivula renkontiĝo. Ĝenerale tiel okazis, kiel oni planis. Venis multaj konataj kaj nekonataj vizitaĵoj - sufiĉe multnombraj por la severa vetero kaj malbonaj vojaj kondiĉoj.

Tamen min maltrankviligas la fakto de nepartopreno de novosibirskanoj. Ĉu ekzistas junulara movado en tiu ĉi urbo? La fakto estas alarma, kaj ni, siberiaj geesperantistoj, devas amase helpi al la kamaradoj, por ke daŭre progresu en la granda urbo granda movado!

Dum la kunsidoj estis akre kritikita SEJT-17. Kelkaj proponoj tamen estas esti akceptitaj per la sekva SEJT. La plej grava manko de la tendaro: la aktivularo ofte ignoris komencantojn. Ridinda fakto! En la armeo ekzistas tia nelegala dispartigo je "avoĵ" kaj "salagoĵ". Ĉu ni proksimiĝas al simila rezulto? Kiaĵ ni devas esti, aktivuloj, en tendaro rilate al la komencantaro: pli aĝaj, pli saĝaj... aŭ eĉ sovaĝaj? Mi povas nur la solan diri: ni ne devas esti "fiera" nulo, sed ĉiam helpi al niaj junĝj gekamaradoj. Ĉu tio ĉi estas granda novaĵo por ni? La partoprenantoj de OSER-25 bone komprenis la situacion kaj multparte akceptis la kritikon pri la pasinta SEJT. Estas decidoj, kiuj estas plenumendaj per siberianoj. Sed ĉu per vi?

Tre aktive kaj fruktodone estis pridiskutitaj problemoj de MEM-agado en kadro de SEJM. Kontaktado kun lokaj packomitatoj, utiligo de Esperanto en la monda pacmovado, kiel oni devas kunlabori kun pacdefendaj komitatoj - interesajn kaj diskutindajn demandojn oni solvis. "Esperanto servu la pacon!" - sub tiu ĉi slogano ni batalas. Ni servu per E al la paco kaj amikeco!

A. Gončarov dum la kunsido prelegis pri Esperanto en scienco - interesa prelego, bonaj perspektivoj. Venis propono organizi en 1977 studentan ~~Sciencan~~ konferencan de esperantistoj surbaze de studentaj sciencaj E-konferencoj de du regionoj: de la Altaja kaj Krasnojarska universitatoj. Kuraĝa ideo! D. Lukjanec konatigis la partoprenantojn kun poeziaj tradukaĵoj en E. Estas agrable aŭskulti, kiam prelegas en E homo legoscia, kompetenta pri la objekto de l' prelego, eĉ la kelkopo de komencantoj kun plezuro aŭskultis.

La proksimiĝanta 25-a kongreso de KPSU donis ankaŭ laboron por la cerboj de l' partoprenantoj. Memkompreneble, ke la partian kongreson la esperantistaro devas renkonti kun bonaj sukcesoj en agado (edukado de l' internaciismo, E-pacbatalo ktp.). Ne ĉiu klubo povas fari ion "b-pokan", sed oni devas almenaŭ fari solenan kunsidon, sendi gratulon, aperigi artikolon ktp.

Dum la tria tago de l' renkontiĝo estis pridiskutita problemo interesa: kiel ni devas prepari komencantojn al la tendaro? Reala vojo: Ĉiuj partoprenantoj de SEJT-18 el Siberio veturos ~~Ka~~ E-karavane el Barnaul per trajno. Interesa kaj freŝa ideo! Eble aliaj SEJM-regionoj sekvos nian ekzemplon?

Jen kian seriozan laboron faris ni dum OSER! Tamen ne nur pri serioza laboro ni okupiĝis dum la festo. Ĉu ni ne estas esperantistoj? Ni havis bankedon, dancadon kaj gajan vesperon. Ni ridis, ĝercis, kantis kaj vagabondis... La ĝenerala aspekto de OSER estas bona. Sed la organiza flanko estas kritikinda, kaj la organizontoj de OSER-26 tion devas rememori ĝustatempe kaj ne fari samajn erarojn.

V. Sapoĵnikov (Krasnojarsk).

LA ESTONTO MONTROS

La 28-an de septembro okazis jarkunveno de Klaipeda Esperanto-klubo. Ĉi estas unue el la gravaj aranĝoj de nia klubo, ĉar de ĝiaj rezultoj dependas la estonta kluba agado. Post la raporto de la prezidanto J. Bilkštys, sekretario R. Keliuotis, kassistino V. Vaitkurčiene kaj revizia komisiono (V. Baniulaitis) sekvis aktiva diskutado. La pasinta laboro de la estraro estis taksita kontentige. La plej respondeca parto de la kunsido estis reelekte de nova konsilantaro. Ĉi-jare la konsilantaranoj estis elektataj rekte al ĉiu posteno, sen posta distribuo laŭ la postenoj.

Kiel prezidanto estis elektite malnova kapable aktivulo V. Baniulaitis. Viceprezidantoj igis la prezidinto J. Bilskis kaj eksestro de la propagando fako B. Tomšis, sekretarioj - L. Rvietkiene, H. Vaitkevičius - da jam delonge aktivaj membroj. Kiel kassistino restis V. Vaitkevičius. Ŝi gajnis la meriton de la kluboj pro sia diligenta kaj abunda laboro. Sub ŝia gvido la kluboj kase kaj biblioteko konsiderinde riĉiĝis. Pri mastrumado de ĉi okupiĝas la estinta klubejestro V. P. Adlauskas. SRJM-representantino igis J. Norvilaite. Do, la konsilantaron oni elektis sufiĉe bonan, kaj la membroj povas esperi pri sukcesa laboro. Estas dezirinde, ke la konsilato de la konsilantaro stabiligu almenaŭ por 2-3 jaroj, por ke ĉio, kion oni planas, estu efektivigata.

En la kluboj funkcias 5 fakoj: kanta, magnetofona, kolektanta, tradukista, historia-bibliografika. Ĉiuj ili estas gvidataj de apartaj fakestroj, kaj tio promesas fruktodonan laboron.

En la fino de la jarkunveno estis premitaj la plej aktivaj membroj de la kluboj. Post la informoj kaj anoncoj oni aŭskultis la surbendigaĵojn de la ĉebaltia koncerto en SRJT-17.

Ekde septembro en la kluboj funkcias kursoj por komencantoj (litova kaj rusa grupoj). En oktobro ekfunkciis progresanta kaj perfektiga kursoj. Bedaŭrinde ne klaras la afero pri la fakultato de amikco kun popoloj de la mondo de la urba popolo universitato, ĉar la opinioj de la konsilantaro pri tio, ĉu ĝin devas eniri la tuta E-klubo, disiĝas. Kaj vane, ĉar amikiĝo kun aliaj popoloj estas unu el la plej ĉefaj celoj de ĉiu klubo, de ĉiu esperantisto.

Nun en Klaipeda videblas plivigliĝinta klubo agado. La plano de la klubo agado por 1975 estis disdonita al ĉiuj membroj. Dume ĝi estas sukcese efektivigata.

La kluboj funkcias ĉiun jordon kaj dimenĉon kun la planita tagordo, kaj tio allogas visitantojn, sed kiel deĉas la laboro plu, ankoraŭ estas malfacile diri. Do, dume ĉio iras glate, kaj la estonto nentros sin mem.

R. Keliuotis (Klaipeda).

LABORRAGOJ DE POLTAVAJ GOSPERANTISTOJ

En la kvanto de la plej aktivaj kluboj en Sovetunio jam de kelkaj jaroj eniras poltavaĵoj gosperantistoj. Fruktodone laboras la E-klubo de la fakultato de sociaj profesioj de la Poltava agrikultura instituto (prezidanto - studento de la instituto A. Kolesnik, gvidante - ĉefinstruisto V. E. Močovkin), kies dekjaran jubileon oni celebros en februaro 1976, kaj E-sekcio de la Poltava komerca lernejo (gvidante - O. Smalke).

Gosperantistoj ĉiusemajne laboras en la kursoj, faras ekspoziciojn, dekoracias fotomuntaĵojn kaj standojn, prelegas pri E kaj aranĝas vesperojn kun koncertoj, partoprenas en respublikaj kaj tutuniaj E-aranĝoj. En la lingvo Esperanto studentoj prelegas dum sciencaj konferencoj, kaj, certe, korespondas kun samguloj. Tiel A. Kolesnik havas korespondantojn en 10 landoj. Ekde printempo de tiu ĉi jaro perse ne mi ricevis multnombrajn leterojn ne nur de sovetiaj E-istoj, sed de eĉ pli granda nombro de esperantistoj el 30 landoj. Fakte, poltavaj esperantistoj havas gemitojn sur la tuta planedo. Antaŭdelonge la urba komitato de komunistoj subtenis la iniciaton krei urban E-klubon de lernantoj kaj urban klubon de studentoj, lernantoj de teknikaj mezlernejoj, geofizikistoj kaj gelaboristoj. La ĉefa enhavo de tiuj ĉi kluboj estas kune kun kluboj de internacia amikco evoluigi kaj profundigi ligojn kun sovetiaj kaj eksterlandaj samguloj surbaze de la soveta patriotismo kaj proletinternaciismo per korespondado en la lingvo Esperanto. Tion antaŭis granda klariga kaj propaganda laboro. En interparoloj kaj prelegoj la esperantistoj rakontis al junularo pri la lingvo Esperanto kaj ĝia signifo por nuntempa homo. Antaŭe kun se-

kretarioj de komsomolaj organizaĵoj kaj poste kun superaj pionirgvidantoj de mezlernejoj estis aranĝitaj speciale vastaj klarigaj interparoloj, post kiuj ili mem komencis propagandi Esperanton en siaj laborlokoj. Por helpi ilin la urba komitato de komsomolo dissendis afiŝon-anoncon, kompilitan de E-aktivuloj. Kelkaj gazetoj de la regiono publikigis artikolojn pri E, kaj la regiona radio envicigis en ŝatatan de radioaŭskultantoj disaŭdigon mian rakonton pri la Lingvo Internacia kun originalaj scenetoj, ĝustalokaj komentoj kaj alvokoj al junularo studi Esperanton.

Ĉio tio ĉi kondukis al tio, ke multaj kun granda deziro komencis studadon de Esperanto.

V.V.Grigorenko (314028 Poltava-28,
str. Ĉiolkovskogo, 67 - 197).

REGAS "LIA MOŜTO" LABORISTA KLASO!

Dum la oktobraj festotagoj mi vizitis Kievon. Tie en la str. Vladimirskaja, 71, en la klubo "Piŝĉevik" (Podol) kolektiĝis la aktivularo de la E-societo "Ora Pordego", gvidata de M.Lineckij. Li elbatalis sufiĉe bonan lokon en la klubo de nutraĵistoj, kie E-rondeton gvidas juna Sveta Pogorelaja, lasinte sian iaman klubon "Stroitelj" por sia iama kursanino-lernantino Saŝa Gusakovskaja; mem Miŝa Lineckij laboras en la 197-a mezlernejo kun 25 sesklasanoj-esperantistoj.

Unue, ili legis la lastan numeron de "Aktuale" kaj parolis pri taskoj, poste sekvis lingva praktiko. Mi ne scias, ĉu ili pristudis la troerudician kartvelan verkon de Arĉil Alĉaziŝvili "Psikologiaj fundamentoj de buŝa fremdlingvo", sed la principo de utila sociludo "Psikologiaj taskoj", uzata de kievanoj, estas rekomendinda al aliaj junularaj E-klubo kaj E-kursoj. Mi priskribas ĝin.

Ĉiu membro de la E-klubo devas "alporti" sian "psikologian taskon"; kiun laŭvice solvas aliaj, donante demandojn al la enigmisto; la lasta havas rajton respondi: "jes", "ne" aŭ "ne gravas". Oni donas centojn da demandoj, ĝis kiam iu divenas. (Jen estas tri situacioj: 1) Sonas telefono. Tiu, al kiu oni telefonas, levas la aŭskultilon. Sed tiu, kiu telefonis, samtempe mallevas la aŭskultilon. Tiel ripetiĝas trifoje. Kial? 2) Si demandas: "Ĉu vi amas min?" Li respondas: "Jes!" Si mortas. Kial? 3) Vakeru petas glason da akvo. La barmen' pafas en la aeron. La vakero dankas kaj foriras. Kial? (La solvoj: 1) Unu vekis alian; 2) Akrobato tenis ĝin per dentoj; 3) La barmen' savis lin de hiko.)

Se aldeni komunan kantadon (en angulo staras piano!), la E-junularo en Kievo sentas sin tre gaje, estimante unu la alian, sentante kamaradecan atmosferon. Oni atendas, ke Jura Kovalĉuk, kiu organizis E-vivon en la ped.instituto, Olja Kerzjuk el la universitato baldaŭ frapos en la "Ora Pordego".

Mi forlasis Kievon kun serena humoro: regas ĉi-tie "Lia Moŝto" laborista klaso (ĉiuj pordeĝanoj estas simplaj laboristoj), kiu serĉas kaj trovas, batalas kaj iom post iom atingas bonajn rezultojn.

A.Rogov (Ĥmelnickij).

EROJ DE SPERTO

Jen miskribas la titolon de ĉiartikolo kaj ekpensis: estus taŭge havi sur la paĝoj de "Aktuale" rubrikon, nomatan proksimume same. Sub la rubriko oni povus publiki en mallonga formo diversajn opiniojn, proponojn, konsilojn kaj raciajn eldirojn el tro longaj artikoloj. En ili oni temu pri ĉiuj nuancoj de praktika kaj propaganda laboro. La rubriko eĉ per sia ekzisto instigus aktivulojn kaj veteranojn interŝanĝi diversajn spertojn. Ankaŭ komencantoj iam povas proponi tre freŝajn kaj originalajn ideojn.

Jen estas mia simpla kontribuo ĉi-rilate. En tre grava politika revuo aperis tre aŭtoritata komentario pri la helplingva problemo. Kiel, verŝajne, multaj, mi eksciis pri tio, kiam la revuo jam feres-tis en kioskoj. Kien fari? Ĉu ŝteli en biblioteko?.. Tamen restis sola reala vojo por trovi la presaĵon. Mi vizitis proksiman poŝtejon, klarigis al ĝia estrino mian necesegon kaj tre ĝentile petis ŝin doni al mi la adresojn de la abonantoj. Duono de la problemo estis solvita. Poste mi laŭvice vizitis la abonantojn kaj preskaŭ sen aventuroj kolektis kelkajn eluzitajn ekzemplerojn de la serĉata numero. Konkrete temas pri "Nova tempo" (presata en ek lingvoj) kun artikolo de M.J. Isajev.

Komprenoble, tiun ĉi "metodon" oni devas uzi en ekstremaj okazoj. Ĉefe - klubanoj mem devas ĝustatempe atenti kaj provizi necesajn periodaĵojn.

I N F O R M O J * A N O N C O J * P R T O J * S C I I G O J

RIPOZI EN BULGARIO

Laŭ informo, ricevita el Bulgario, la vica Internacia Arkeologia brigado okazos ankaŭ en aŭgusto (vd. "A"-3(18), p. 34) de la komenco de aŭgusto. Krome, de la 25-a de septembro ĝis la 5-a de oktobro en Velingrad okazos tradicia Internacia Esperantista Ferio, al kiu estas invitataj ankaŭ sovetaĵ E-istoj (la lastan, ĉi-jaŝan, partoprenis 65 E-istoj, el kiuj 4 - sovetaĵ). La dezirantoj veturi Bulgari-
on skribu al mi sinproponojn, indikinte la plenan nomon, aĝon, ĝustan kaj plenan adreson, profesion kaj kiun arangon li(ŝi) intencas partopreni. Ne forgesu aldoni ~~re~~ rekomendon de la SEJM-representanto.

Por la hodiaŭa tago al la Brigado aliĝis 3 personoj, al la Ferieo unu.

D. Cibulevskij, unua v/p de SEJM (310024
Barkov-24, Ĉajkovskogo-25, kv. 11).

* * * * *

Ĝis la 1-a de februaro mi akceptas abonpagojn por 1) "Kulturaj k-
ajeroj" (Francio; aperas 6-foje jare; kostas 5,00rb.; la 1-a numero aperas marte-maje); 2) "Starto" (Ĉeĥoslovakio; aperas 6-foje jare; kostas 1,50); 3) "Panoramo" (ĈSSR; 2-foje; 1,90rb.). Krome mi akceptas mendojn por "Heroldo de E-to" (9,50-10,00 rb.) kaj nova kultur-literatura jugoslavia revuo kun la provizora titolo "La verda stelo" (detaloj dume ne estas konataj). La monon kaj mendojn oni sendu al: Aleksandr Sergejeviĉ Melnikov, 344007 Rostov-Don-7, ab. jaŝĉ. 393 ĝis la indikita dato.

* * * * *

NI GRATULAS!

La 28-an de novembro la prezidanto de SEJM V. Aroloviĉ defendis disertacion je la kandidata grado pri fizik-matematikaj sciencoj. Parte de la disertitaj materialoj aperis E-lingve en "Tezoj de konferenco de junaj sciencistoj-esperantistoj" (Kievo, 1971).

* * * * *

TELEVIDA ELSENDO EN UFA

La 7-an de oktobro 1975 la Baŝkiria televido en Ufa elsendis duonhoran programon sub la titolo "Esperanto - lingvo por ĉiuj". Ĝi estis farita kiel konversacio de 11 personoj, kun kvin kantoj kaj ĵmulta ilustra materiale. Abundas favoraj reĉoj. Petu al viaj lokaj televidaj stacioj ripeti la elsendon, skribu al: 450025 Ufa-25, televido, ĉefredaktero.

* * * * *

BIJSK

En la urbo ekde la 27-a de oktobro 1975 funkcias E-rondeto, gvidata de I.Korolev. La rondeton vizitas ĉ. 20 homoj: studentoj, glernantoj, junaj laboristoj.

ĤMELNICKIJ

La 1-an de novembro 1975 la Ukraina Radio pere de Ĥmelnicka studio aranĝis 15-min. rakonton pri la laboro de la E-klubo kaj la 7-monata kurso ĉe Kulturdomo. La elsendo estis en la rubriko "Mondo de viaj pasioj" kaj pasis en formo de intervjuo de la prezidanto de E-klubo A.Rogov, kiu rakontis pri sia vasta korespondado, pri la unua ukraina lernolibro de S.Rublev, pri E-rondetoj en la urbo... Fine la radioparolisto koncise rakontis pri la historio de E kaj ties movado.

Respondo de APN al letero de A.Rogov.

Estimata k-do Rogov!

Ni dankas Vin pro la letero, en kiu estas eldiritaj konvinkaj pensoj pri Esperanto, kaj precipe pro la informo pri la decido de la prezidio de la Instituto de lingvosciencoj ĉe la Akademio de Sciencoj de USSR.

La celo de la artikolo "Tupal anstataŭ Esperanto?" estas konkreta: ankoraŭ per unu streko (pri spekulacio per "tupal" skribis meksika revuo "Tjempo" N^o 1719, p.49) reliefigi la portreton de la okcidenta moralo, montri la ĉiepenetran spiriton de komerco.

Ni tute ne intencis nigrigi Esperanton, kiu, kiel Vi prave asertas, estas unu el multaj rimedoj de internaciaj rilatoj.

N.Gabinskij, redaktoro de la ĉefa redakcio de operativa informado APN.

La 18-an de nov. 1975

KALUGA

En komunloĝejo de la Kaluga ĉefpoŝtejo estas organizita E-rondo. Kiu povas rekte al ni skribi pri sia sperto, pri laboro en simila loko, en simila medio? Por la komencantoj estas dezirindaj ankaŭ salut-poŝtkartoj. Skribu: 248016 Kaluga-16, ul. Barrikad, 126-4, E-rondo.

TIFVIN

Ĉiuj SEJM-klubo povas ricevi surbendigitan elpaŝon de la Prezidanto de UEA H.Tonkin en la Domo de Amikeco en Leningrad kaj lian intervjuon pri la restado en nia lando. Sendu puran magnetofonbendon 100 m. per la Rapideco 9,5 cm aŭ 200 m. per 19,0cm al Aleksandr Kogan: 187500 Leningradskaja obl., Tifvin, ab. jaŝĉ. 2.

En Tifvin estas fonditaj du novaj E-kursoj: en la urba Kulturdomo kaj en la lernejo N^o 8. Entute partoprenas ĉ. 50 personoj 15-30-jaraĵ. La kursanoj serĉas korespondadon kaj amikan subtenon de SEJM-kl.

DEZIRAS KORESPONDI

1. F-ino Josna Cukor, 1541000 ZAGREB, Zadarska 18, Jugoslavio.
2. Janos Gaal, 24 8946 Pozstaederics, Kossuth 32, Hungario (sperto, turismo, E-movado).
3. Kowal Margarita, ul. Wojska Polskiego 27-a, 37-200 Pozewarsk, Pollando (17-jara: kantoj, filatelio, aŭtomobiloj).
4. Saul Benito Serra, Rua Antonio Rodrigues Pimen tel. N^o 8-1, Montigo, Portugalio.
5. Slovenia Esp.Ligo, Komenskega 7, Ljubjana, Jugoslavio.

S.Neilande, estrino de la Koresponda Fk.

INFORMA FOLIO DE LA SCIENC-TEKNIKA FAKO DE SEJM

Nº2

Decembro 1975

MIKROBENDOJ

de biblioteko ĉe la Scienc-Teknika fako de SEJM

- 1.E.Drezen. Za vseobŝĉim jazikom (tri veka iskanij), Moskva, 1936.
- 2.E.Drezen. Problemo de internacia lingvo en nuna etapo de ĝia evolu-
o, Moskva, 1936.
- 3.E.Drezen. Osnovi jazikoznanija, teorii i istorii meĵdunarodnogo ja-
zika, Moskva, 1933.
- 4.E.Drezen. Skizoj pri teorio de Esperanto, Moskva, 1936.
- 5.I.Lapena. La Internacia Lingvo.
- 6.E.Drezen. Internacionalizacija nauĉno-teĥniĉeskoj terminologii, M., 1936.
- 7.E.Drezen. Osnovi nauĉno-teĥniĉeskoj terminologii, Moskva, 1936.
- 8.S.Istvak kaj R.Rezso. A.Vallalatiranuitasi scamitogepalkalmazas feĝ-
almainak több nyelvű szótara. (Komputil-teknika vortaro hungara-ger-
mana-angla-rusa-Esperanta), Budapeŝt, 1972.
- 9.Vasuti kis szakszótár. Fervoja terminareto Esperanto-Hungara, Hung-
ara-Esperanta, Budapeŝt, 1968.
- 10.Tibor Ujlaky-Nagy. La sporta lingvo en Esperanto, Budapeŝt, 1972.
- 11.Cr.A.Laisant. Inicado Matematika (esperantigita laŭ la 10-a eldono f-
ranca de J.-C.Chasignes kaj J.Camescasse), Paris, 1914.
- 12.Petar Giunio. Sekretoj de la magistaĵoj (originala verko en Esper-
anto, reverkita de Lic.Marinko Givoje), Zagreb, 1960.
- 13.Verkoj de D-ro Nakamura (originalaj sciencaj artikoloj, paroladoj
kaj rakontoj en E), Tokio, 1932.
- 14.Niŭton J. Monteĵro. Laŭsistema studo de Funkcioj (originala verko
de elementa esprimado en Esperanto), Sanpaŭlo, 1960.
- 15.Maurice Frechet en Paris. La paranalitikaj funkcioj en "n"-dimensi-
oj (origin. art. en E, aperigita en germana revuo "Journal für die
reine und angewandte Mathematik"), Berlin, 1956.
- 16.Maurice Fréchet. La kanonaj formoj de la 2, 3, 4-dimensiaj paraanali-
tikaj funkcioj (orig.art. Aperis en internac. rev. "Matematika"), 1954.
- 17.F.Emerson Andrews. Ekskurso en nombroj (origin.art., aperigita en "The
Mathematics Teacher"), N.Y., 1934.
- 18.Internacia elektroteknika vortaro, Esperanto-pola, angla, franca, ge-
mana, itala, sveda (grupo 07 Elektroniko, grupe 08 Elektroakustiko),
Warszawa, 1965.
- 19.A.Broise. Teknika terminaro pri ŝoseoj kaj pontoj. Rotterdam, 1959.
- 20.Eugen Wüster. Maŝinfaka Esperanta vortaro prielementa (la maŝinelem-
entoj, maŝinoj, plej gravaj esprimoj el la konstruadokaj teknologio),
Leipzig, 1923.
- 21.Ryama-Tokiziroo. Aŭta terminaro. Esperanto-japanaj, angla, Japana-Esp-
eranta-angla, Tokio, 1969.
- 22.A.Venture. Radio-terminaro. Ontario, 1960.
- 23.F.Meyboom. Quaestionarium medicum in english, french, italian, spanish,
portuguese, german, dutch, norwegian, swedish, finnish, polish, russian,
greek, chinese, japanese, malay, Esperanto. Amsterdam-New-York, 1961.
- 24.D.R.Duncan, Ph.D., B.Sc. Angla-Esperanta kemia vortaro, London, 1956.
- 25.Jan Piĉro. Kemiaj afiksoj internaciaj. Warszawa, 1966.
- 26.M.C.Butler kaj F.Merrick. Muzika terminaro. Ontario, 1960.
- 27.Komandanto Peter Clissold. Marista terminaro. Rickmansworth, 1950.
- 28.Konstruteknika terminaro sveda-Esperanta kaj Esperanta- kun difin-
oj en E. Malmö, 1958, Svedio.

Por mendi indiku la numeron de koncerna mikrobendo kaj skribu laŭ
la adreso: 187500 Tifvin, ab.kesto 2, Esperanto-klubo. La koston de fo-
tokopiita verko mi sciigos post plenumo de la laboro.

Karaj samideanoj, bonvolu sendi por mikrobendigi viajn terminaro-
jn, sciencajn kaj popularsciencajn artikolojn, verkojn. Komencu mem
verki pri via ŝatata scienca, teknika aŭ eĉ "hobia" okupo en Esperan-
to. Resendon mi garantias.

A.Kogan, estro de la Terminara centro (Tifvin .

METODIKO
de tradukado de "Technisches Wörterbuch"
(Germana-Esperanta terminaro) de R.Haferkorn

I. Literaturo kaj materialoj por la laboro

N/A	Titolo, jaro de eldono	Indiko
I.1	"Technisches Wörterbuch", R.Haferkorn, 1967 (aŭ fotokopio)	(TW)
I.2	"Deutsch-Russisches politechnisches Wörterbuch", 1973	(DR)
I.3	Esperanto-rusa vortaro de E.Bokarev, 1974	(ER)
I.4	Ruso-Esperanta vortaro de E.Bokarev, 1966	(RE)
I.5	Slipoj (dimensio 9x13 cm)	

II. Unuaetapa sliparo

II.1. La germanan terminon el (TW) skribu supre en la maldekstra angulo de slipo (vidu ekzemplon).

II.2. La konforman Esperantan terminon skribu supre en la dekstra angulo de la slipo kaj indiku la fonton: (TW).

II.3. El (DR) elskribu ĉiujn konvenajn ruslingvajn terminojn kaj indiku la fonton: (DR). Uzu nur la maldekstran parton de la slipo.

II.4. En (ER) trovi la Esperantan terminon. Se la ruslingvaj terminoj en (DR) kaj (ER) egalas, tiam aldonu la indikon (ER) al (TW): (ER)(TW). Se ili diferencas, skribu la novan rusan terminon malsupre de la dekstra parto de la slipo kaj indiku la fonton: (ER). Se la termino forestas, indiku: (ER)-.

II.5. Sub germana termino, ne trovita en (DR), indiku: (DR)-. P-rovu laŭeble traduki ĝin helpe de aliaj vortaroj.

II.6. Aliajn fontojn indiku laŭ via bontrovo kaj informu pri ili la TS-estron.

Envolu skribi slipojn tre legeble.

III. Dusetapa sliparo

III.1. Ĉiun rusan terminon skribu sur aparta slipo supre en la maldekstra angulo.

III.2. Konformajn Esperantajn terminojn skribu supre de la dekstra angulo kaj indiku la fonton: (TW) aŭ (ER) aŭ (TW, ER).

III.3. La rusan terminon kontrolu laŭ (RE). Se la termino koincidas, tiam aldonu la indikon (RE) al (TW): (TW)(RE). Se ĝi ne koincidas, tiam aldonu la novan varianton de Esperanta termino kaj indiku: (RE). Se la termino forestas, indiku: (RE)-.

III.4. Ĉiujn duaetapajn slipojn kunigu kun la koncerna unuaetapa slipo, surbaze de kiu ili estas faritaj, per kancelaria pinĉilo aŭ alimaniere. Tio ĉi necesas por kontrolo.

III.5. Viejn dupojn, preponojn ktp. pri apartaj terminoj skribu sur la unuaetapajn slipojn aŭ sur apartan folion.

III.6. Ĉion sendu per parte laŭ la adreso: 187500 TĤEVIN Leningradskoj obl., ab. jaŝĉ. 2, Esperanto-klubo, Kogan Aleksandr.

(Rim. de la Red.: Novuloj! Antaŭ ol komenci traduklaboron kontaktu k-don A.Kogan por ricevi de li la taskon).

IV. Ekzemple de prilaboritaj slipoj

Unuaetapa slipo

ätzen	korodi
(mech, chem.)	eĉi (TW)
1. Травить, встраивать	korodi -
-корродировать	(ER)
2. Разрезать	
3. Прорезать	
4. Манипулировать (стекло)	eĉi (ER)-

Dusetapaj slipoj

Тробома	korodi (TW, ER)
	eĉi (TW)
Корродировать	korodi (ER)

*La suplementojn N^o 1, N^o 2, 3 vd. en "A"-1(16), 3(18). - Red.